

**Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 8-a de Decembro 2020**

(zom-kunveno)

**Ĉeestantoj:** Jehoŝua Tilleman, Mikaelo Lineckij, Ŝlomo Ŝaĥar, Amri Wandel, Gabi Zeevi.**Gastoj:** (partatempe) Larysa, Viktor, k.a.*Protokolo de la pasinta kunsido estis sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.***1. Oficejo** (Amri)

a) **Amri** vizitis oficejon ĉe 75 Herzl-strato en Ramat-Gan (“Oazis-domo”), 18 m<sup>2</sup>, kiu tre taŭgas pro siaj kondiĉoj: la postulata prezo (310,000 NIS), paganta lunto (1,000 NIS plus impostoj); havas parkejon (15 NIS hore) kaj servojn, kiel kuirejo, prelegejo (salono de 40 m<sup>2</sup> kontraŭ 75 NIS hore + VAT) kun aparatoj kaj kafo, vestiblo; proksima al la publikaj transportiloj. La fina kosto (kun ĉiuj impostoj kaj 15,000 NIS al la makleristo): ĉ. 400,000 NIS. En nia kaso restos ĉ. 30 mil; iom pli, se ni forlasos WIZO-n. Amri kontrolis la katastro-registron.

b) **Gasto:** la makleristo Matan prezentis sin per kelkaj vortoj hebree kaj pretis respondi al eventualaj demandoj.

c) Amri prezentis bildojn pri la oficejo.

ĉ) **Voĉdono:** ĉu ni volas aĉeti? **Decido:** unuanime jes! Ni proponu ne malpli ol 280,000 NIS, por aspekti seriozaj. Amri kaj Ŝlomo estas rajtigitaj subskribi la kontrakton. d) **Demando:** ĉu ni devos doni al la lunto kvitancon aŭ fakturon? **Esplorenda!**

**2. Zamenhofa Vespero – la 15-an de Decembro** (Jehoŝua)

a) Ni malfermu la zom-kunvenon je la 17h45, kaj la programo mem komenciĝos je 18:00. Estu en la mezo 10 minuta paŭzo por refreŝiĝi. La fino povos esti ĉ. la 20h00. La artaj kaj oficialaj programeroj estu interplektitaj. Prezidenteco: proponota al Oded Gilad.

b) Amri, Jehuda Miklaf, Jehoŝua, Amir Naor, Israela Becker, Doron Modan, Enrica Arbib povus kontribui por la arta parto.

c) Inter la oficialaĵoj estos raportoj de Jehoŝua, Kontrol-Komisiono far Ŝaŭl Ĥasid, kaj Ŝlomo proponos la buĝeton por 2021; pri la du lastaj necesos voĉdona aprobo de la Ĝenerala Kunveno, sed ne okazos elektoj por la Estraro (ja, lastfoje la Ĝenerala Kunveno decidis elekti la Estraron por du jaroj).

**3. Buĝet-propono 2021** (Ŝlomo)

Ni komencas la jaron per ŝuldo. Do, la profito – pri kio la Registristo tiom zorgas – eĉ ne sufiĉos por kovri ĝin.

.../2



#### **4. Dratverejo** (Jehoŝua)

Jehoŝua vizitis la luanton, Dima Nemirovski, en la hospitalo “Iĥilov”, la 30-an de Novembro, kie li kuŝas post kaj antaŭ operacioj. Lia kunulino, Marina, vizitadas lin. Dima ne kontaktis kun Amos Ŝapira, al kiu li devis doni dumonatan pagon por ni – sed la mono estas ĉe Marina. Dima volas subskribii la Apendicon al la Kontrakto (por ricevi la subvencion el la Ministerio pri Loĝigo) kiun Jehoŝua preparas.

#### **5. Israela Esperantisto n-ro 170** (Mikaelo)

Ĝi estos prezentota dum la ZV. Amri sendos ankoraŭ aldonajn tekstojn al Mikaelo. Gabi kaj Andrej finos la provlegadojn. Gabi interkonsentis kun Jehoŝua kaj Mikaelo pri aldono de mallonga rubriko: “Forpasoj” (aŭ “Kondolencoj”) – kiel estas ankaŭ en la UEA-organo, kaj kiel ni decidis en Septembro.

**La venonta kunsido:** la 5-an de Januaro, 2021, je la 20h00 (*zom-kunveno*)

**Protokolis:** Gabi Zeevi